# Vorto de la Federacia Prezidanto Jan. 2007

Publikigis : ***Norda Gazeto**, nro 4/407, Jan. 2007** * Kvaronjara revuo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio

POLA RADIO en Esperanto plu estos ! Tion decidis la estraro de la landa radiosocieto, fine de sia pripenso pri ĉesigo de la ĉiutagaj elsendoj far la Esperanto-redakcio, kiun kondukas sino Barbara Pietrzak. La esperantlingvaj elsendoj plu fariĝos, sed ekde la 1a de Januaro 2007 ilin oni povos aŭdi ekskluzive per Interreto — ne plu per mallongaj radioondoj nek per satelito (nuntempe 90 % da aŭskultantoj aŭdas per Interreto). Tiu finfina decido konservi la Esperanto-elsendojn rezultas el la vastskalaj kaj densaj reagoj kaj leteroj de la tutmondaj esperantistoj al la radio-estraro, la pola ministrejo pri eksterlandaj aferoj kaj la polaj ambasadorejoj kaj konsulejoj. Nia Nordfrancia Federacio kaj niaj klubanoj aktive partoprenis en tiu subtena movado : niaj klopodoj utilis kaj donis fruktojn. Dankon al ĉiuj pro via kontribuo ! Ni nun deziras al la Esperanto-redakcio de Pola Radio bonŝancon por la estonteco.

La jaro 2007 estos grava por nia Federacio. Okaze de la antaŭvideble elstara federacia kongreso de la 30a de Septembro 2007 en Araso (Arras) stariĝos la nova Federacia Komitato, kiun vi estos koresponde balotinta. Ĉar por la unua fojo la komitatanojn ni baldaŭ elektos per poŝte sendotaj balotiloj surbaze de listo da kandidatoj — simile kiel okazas la baloto pri la komitato de UFE. Tre baldaŭ la Estraro informos vin pri la balota proceduro. Kaj espereble pluraj el vi deziros kandidati ! Nia regiona movado ja bezonas ĉies fortojn kaj kontribuojn — de la nordfranciaj esperantistoj kaj de la Esperanto-kluboj. Jen kial — krome de mia alvoko al kandidatiĝoj por la Federacia Komitato — mi alvokas ankaŭ la klubojn por membriĝi al la Federacio (membras jam kvin kluboj) : ili tiel povos plene kontribui al la politikojn kaj decidojn de la Federacio, provizinte almenaŭ unu federacian komitatanon. Por ebligi rektajn interŝanĝojn inter ĉiuj vi kaj la Estraron, mi mem kun estrarano vizitos la klubojn en la unua trionjaro.

Inter niaj plej gravaj agokampoj estas kulturo kaj instruado. Pri kulturo — la Federacio de nun partoprenos en la « Regionaj Ĉefurboj pri Kulturo », t.e. nova kultura programo de la Regiona Konsilio de Nord-Pas-de-Calais. La unua kultura ĉefurbo estos Valencieno (Valenciennes) dum la jaro 2007 : ĝi gastigos multajn profesiajn kaj asociajn aranĝojn. Kadre de la oficiala programo, la Federacio kaj la klubo *Valenciennes-Espéranto* organizos Esperanto-spektaklon kaj prezentojn en Valencieno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Ni pli detale informos vin pri tio, kaj invitos vin spekti kaj partopreni ! Pri instruado — nun kiel kutime la Federacio organizos dum dimanĉo de Junio 2007 la regionan ekzamensesion kun la trinivelaj ekzamenoj. Fine de Januaro la Estraro indikos al vi la definitivajn daton kaj lokon de la sesio. La sesio verŝajne okazos en Lillo (Lille) aŭ Valencieno.

Fine, vi scias, ke la Federacia Komitato elektis min prezidanto en Majo 2005, dum mi estis vicprezidanto de mia unua, kara klubo *Lille-Villeneuve-Espéranto*. Sekve al mia transloĝiĝo ĉe Valencienon en Januaro 2006, mi informas vin, ke hodiaŭ mi eliras el *Lille-Villeneuve-Espéranto* por eniri en la klubon *Valenciennes-Espéranto*. Danke al mia sperto en Lillo kun Michel Dechy kaj aliaj amikoj, mi esperas kontribui al la sukceso de la Valenciena movado : jen nova, plia celo mia ekde 2007 ! Mi ĝuste, nome de la Federaciaj Estraro kaj Komitato kaj kun granda plezuro, deziras al ĉiuj vi novan jaron riĉan je feliĉo, sukceso kaj prospero sur la kampoj familia, profesia kaj Esperanta ! ■